



Lim-aranĝo en MalSupraDekstra valoras 16 poentojn.

Ni esploru la ĉefajn temojn, lim-aranĝojn en MalSupraDekstra kaj SupraMalDekstra partoj.




Diag. 8 (Koncizigita formo) Unue la 'suben-iro' N1. Por kalkuli la valoron,...




Diag. 9 Oni devas kompari tion kun la kazo, kiam Blanko lim-aranĝas kiel B1 kaj B3. Se Nigro ŝtonmetas N1 en diagramo 8, komparante ĝin kun diagramo 9, Nigra teritorio multiĝas kaj Blanka teritorio malmultiĝas. Sumo de la multaĵo kaj la malmultaĵo kalkuliĝas la valoro de tiu ĉi lim-aranĝo (kalkulo de gajnitaj /malgajnitaj poentoj da diferenco) .


Rimarku, ke ambaŭ Nigro post diagramo 8 kaj Blanko post diagramo 9 respektive havas rajton por lim-aranĝi metrajton-tenante.




Diag. 10 Post diagramo 8, N1 en tiu ĉi diagramo.



Diag. 11 Post diagramo 9, B1 en tiu ĉi diagramo. Sekve,...



Diag. 12 (Rezulto de Nigra lim-aranĝo) Post diagramo 10 rezultas la procedo ĝis B8 en tiu ĉi duagramo.




Diag. 13 (Rezulto de Blanka lim-aranĝo) Post diagramo 11 rezultas la procedo ĝis N6 en tiu ĉi duagramo.

Konklude, kiam Nigro ŝtonmetas N1 en diagramo 8, procedas ĝis B8 en diagramo 12, kaj kiam Blanko ŝtonmetas B1 en diagramo 9, procedas ĝis N6 en diagramo 13. Oni rigardas ĉi tiujn kiel pravaj rezultoj, kaj kalkulas la valoron de la lim-aranĝo ĉi tie.


Nun, inter la diagramoj 12 kaj 13, ambaŭ Nigra teritorio kaj Blanka teritorio havas 8 poentojn da diferencon. Do la valoro de la lim-aranĝoj, Nigra en diagramo 8 kaj Blanka en diagramo 9 kalkuliĝas '16 poentoj da diferenco'.

Jam vi komprenis la metodon por kalkuli la diferencon.

Krome,...



Diag. 14 Malgajname estas 'bati-kaj-sinligi' kiel N1 kaj N3 en tiu ĉi formo.



Diag. 15 Poste Nigro rajtas lim-aranĝi metrajton-tenante ek de N1 ĝis B6. Komparante tion kun diagramo 12, Nigra teritorio malplimultiĝas je 1 poento, kaj Blanka teritorio plimultiĝas je 1 poento. Sume Nigra malgajnas 2 poentojn.